N-o 1. **BULTENO** 1936. 15. I.

## DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA

*Redakcio kaj administracio: Praha XIX., Uralské nám. 447. Telefona n-ro 718-41.*

*Redaktas : O. GINZ, ST. KAMARYT.*

*Senpage por membroj de Ĉs. Asocio Esperantista. Aperas sesfoje dum la jaro.*

# Salutletero al prezidento Dr. Eduard Beneš.

(Traduko de ĉeĥlingva letero.)

Praha 20-an de decembro 1935.

Sinjoro prezidento,

permesu, ke ankaŭ ni salutu Vin respektplene kaj plezure ĉe okazo de Via elekto kaj pardonu, se ni rimarkigas, ke argumento por nia ĝojo estas duopa.

Unue: ni kredas, ke ni apartenas al la tre tre granda plimulto de loĝantaro de la respubliko, kiu estas konvinkita, ke per Via elekto estis la prezidenta ofico konfidita al manoj la plej kapablaj.

Due: ni rememorigas al ni kun fiereco, ke Vi vidigis Vian konsenton kun nia idealo per vico de faroj signifintaj por ni apogon en nia klopodado.

Estu pardonite al ni, se ni dum tiuj ĉi ĝojaj tagoj ripetas datojn de la plej gravaj.

Via subskribo sub rezolucio pri esperanto por Ligo de nacioj 16-an de decembro 1920 kaj 13-an de septembro 1921.

Via letero al Universala Esperanto-kongreso en Praha 30-an de aŭgusto 1921.

Via honora prezidanteco de la konferenco Pacon per lernejo en Praha 16—20-an de aprilo 1927.

Via traktado kun prezidanto de Universala Esperanto-Asocio Dr. Ed. Privat en jaro 1931 pri ebleco de Interŝtata akordo por enkonduko de esperanto en publikajn lernejojn.

Ni petas, sinjoro prezidento, akcepti kun nia admira saluto ankaŭ nian respektplenan dankon pro tiuj ĉi manifestaĵoj vidigantaj pozitivan sintenon koncerne nian celadon.

*Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista*

Stan. Kamaryt, prezidanto. Otto Ginz, ĝen. sekretario.

---

Invito al la

# XVII. ĝenerala kunveno de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista

**okazonta en Praha sabaton, la 15-an de februaro 1936 je la 19-a horo en kafejo Louvre, Národní tř. 20.**

Programo: 1. Protokolo de la lasta ĝen. kunveno. 2. Raporto pri la agado kaj pri la kaso. 3. Raporto de la revizoroj. 4. Eniĝo en Esperanto-Asocion en ĈSR. 5. Elektoj. 6. Liberaj proponoj. (Sendotaj ĝis la tria tago antaŭ la kunveno.)

La komitato.

Rimarko: Laŭ § 16-a de la statuto membroj ne povantaj ĉeesti persone, povas reprezentigi sin per iu membro ĉeestanta. — Laŭ § 17-a la kunveno estas decidrajta, se partoprenas almenaŭ kvarono de la membroj (persone aŭ reprezente). Se ne kunvenis tiu nombro, okazas post unu horo nova kunveno, kiu estas decidrajta sen atento de la nombro.

---

## ESPERANTO-ASOCIO DE ĈEĤOSLOVAKA RESPUBLIKO (EAĈSR).

**Unua kunveno de Centra komitato** okazos en Praha 16. II. 1936 dimanĉon je la 10-a horo matene en kafejo Louvre, Národní tř. 20. Krom la komitatanoj estas invitataj ĉiuj vickomitatanoj kaj anoj de la Kontrola komisiono. La membroj ne povantaj veni persone bonvolu informi pri siaj opinioj, proponoj kaj konsiloj perletere. Ĉio estu adresita al la sekretariejo en Praha—Bubeneč 447, Uralské nám. *Dr. Stan. Kamaryt, prezidanto de EAĈSR.*

# Tasko en jaro 1936!

Vi legas en tiu ĉi numero inviton al ĝenerala kunveno de nia asocio, kiu okazas, kontraŭ kutimo, tre frue en jaro 1936. Ni faros al ĝi proponon, ke ĝi laŭ interkonsentoj dum la kongreso en Brno decidu eniĝi en la nove fonditan

ESPERANTO-ASOCION
DE ĈEĤOSLOVAKA RESPUBLIKO,

kiu daŭrigos nian ĝisnunan laboron sur bazo ankoraŭ pli vasta.

Aperis nepre bezone doni al ĉiuj nacioj en nia respubliko la saman bazon kaj la saman eblon organizi propagandan laboron aŭtonome en sia lingva sfero, sed kiel organizitaj anoj de unusola tutŝtata centro.

Tia unusola nacia propaganda asocio en ĉiu lando estas nepre bezona, por ke povu ekzisti ordo ankaŭ en la internacia organizo, en Universala Esperanto-Asocio, kiu depost la interkonsento Kolonja estas unusola, kiu organizas internacie propagandon kaj servojn.

La statuto akceptita en Brno donas por tio brilan eblecon. Malfacile Vi trovos en aliaj landoj eblecojn pli bonajn.

La kunveno en Brno decidis, ke la nova EAĈSR ekfunkciu la 1-an de januaro 1936. Tio okazas. La ĝisnuna komitato de ĈAE, kiu proponis tiun ideon al esperantistaro nialanda kaj ne ĉesis ĝin efektivigadi, estas en daŭraj rilatoj kun nove elektita komitato. Depost la 1-a de januaro ĝi gvidos la aferojn en konto de la nova asocio kaj post la ĝenerala kunveno ĝi tuj transdonos sian organizon kaj siajn membrojn dividitajn laŭ la lingvoj al komitato EAĈSR.

La nova asocio aligos sian membraron al UEA kiel unusola nacia organizo en nia ŝtato.

Ĝi akceptos ankaŭ la kotizojn de aktivaj UEA-anoj, kiel faris ĝis nun la ĈAE.

La tasko de ni ĉiuj estas zorgi, ke la laboro de la nova asocio estu ankoraŭ pli sukcesa kaj efika ol estis nia laboro ĝis nun.

En la venonta numero de la Bulteno estos detala raporto pri agado de ĈAE dum jaro 1935. Legu ĝin atente, kvankam ĝi estos longa! Vi vidos, kiom da laboro estis farite kaj kiom da danko ŝuldas samideanoj al kelkaj funkciuloj de ĈAE. Vi ne trovos facile societon, kiu kun tiom malgranda nombro de membroj kaj tiom malgranda kotizo liverus tiom da bonkvalita laboro por ideala celo.

Sed pripensu, kioma kaj kiela povus esti la rezultato, se ni disponus pri pli granda nombro da laborantoj kaj membroj kaj pri pli granda sumo de enspezoj!

Tial faru ni ĉiuj nian taskon en jaro 1936! Resti anoj de EAĈSR, resti aktivaj anoj de UEA kaj akiri novajn anojn por tiuj du institucioj, kiuj signifas unusolan organizon de la movado.

## Sumoj de kotizoj restas sen ŝanĝoj:

| | |
|---|---|
| **EAĈSR (kun senpaga Bulteno)** | **Kč 16·—** |
| **UEA-membro kun Jarlibro** | **Kč 25·—** |
| **UEA-membro-abonanto** | **Kč 60·—** |
| **UEA-membro-subtenanto** | **Kč 160·—** |

EAĈSR-anoj pagas al UEA je 3 Kč malpli.

La kotizon sendu per poŝta pagilo n-o 9.602 Praha. Nomo de la konto: Svaz esperantistů, Praha.

## Cseh-metoda instruisto en Ĉeĥoslovakujo.

Principoj, sur kiuj estas bazitaj la ĝenerale spertataj sukcesoj de Cseh-metodo, estas:

1. *Fremdlanda instruisto!* Per tio estas garantiata la senpereco de la instruado.

2. *Humorplena esprimmaniero* de la instruanto uzanta ĉiujn eblecojn de delikata komikeco enhavita en la situacioj de publika kurso! Tio garantias bonan humoron de la kursanoj.

3. Agrableco de *la persono* de la instruanto! Tio malgrandigas emon ĉesi vizitadi la kurson.

4. Nepra postulo de la metodo, ke la kursanoj lernu *ĉion en la kurso,* ke nenio estu rekomendata lerni hejme! Tiu *neekzisto de hejmaj lecionoj* ne fortimigas nediligentajn studantojn.

5. Instruanto Cseh-metoda devas nepre esti persono *eksterordinare taŭga.*

6. *Rapideco* de la kurso.

Ĉar en multaj landoj Cseh-metodaj kursoj havis tre bonan efikon je kresko de nombro de aktivaj esperantistoj, nia Asocio invitis aprobitan Cseh-metodan instruiston sinjoron *H. Seppik,* lektoron el Estonujo. Li komencis sian laboron en Košice la 13-an de januaro 1935. La kursanojn prizorgas nia komitatano s-o Jozef Friedrich, fervoja konsilisto en Košice, Jarná 13. S-o Seppik povas resti en nia ŝtato dum ĉ. 10 monatoj. Ni disponigas lin precipe al tiuj lokoj, kie estas malmultaj esperantistoj. Estas certe, de post 6 semajnoj de lia laborado, kreskos nombro de novaj esperantistoj tre senteble. Ni turnis nin jam al kelkaj lokoj, sed ni tre petas ankaŭ la ceterajn samideanojn, ke ili esploru sian lokon, ĉu estus utile kaj eble aranĝi kurson.

*Financaj kondiĉoj* estas tre facilaj. Sufiĉos, se vi povas kunvenigi kurson kun 40 anoj pagantaj po monato po 30 Kč por tri lecionoj semajne. La kurso ne devas daŭri pli longe. Vi certe ankaŭ sukcesos aranĝi dum tiu monato publikan prelegon pri Estonujo, kies financa rezulto helpos kovri viajn elspezojn por reklamo. La provleciono estas senpaga.

Ni tre rekomendas al ĉiuj niaj fervoruloj provi tiun ĉi aranĝon. Ne timu! La afero estas efektivigebla kaj signifas tute novan metodon de varbado. Skribu al nia oficejo aŭ al samideano Friedrich tuj, por ke ni povu aranĝi taŭgan sinsekvon de la lokoj, kie okazos la kursoj.

## UEA-delegitoj!

Kunvoku la membrojn en via loko dum nuna monato, priparolu kun ili la situacion kaj la venontan laboron. Interesajn ideojn aŭ proponojn sciigu al ni. Enkasigu kotizojn kaj sendu ilin al nia poŝtĉeka konto n-ro 9.602 „Svaz československých esperantistů, Praha".

Komprenu, ke esperanto ne povas ekzisti sen internacia organizo. Klopodu kun ni fortigi ĝin!

---

# Movado.

**Katolikoj.** Ligo de katolikaj esperantistoj en Ĉeĥoslovakujo invitas en sia „Informilo" aperinta en januaro 1936 al *XVIII-a tutmonda kongreso de katolikaj esperantistoj,* kiu okazos en Brno 4.—8-an de aŭgusto 1936. Kongresa kotizo Kč 30·—. La kongresa komitato aranĝos en Brno ankaŭ „Internacian ekspozicion de esperanto", kiu daŭros proksimume de 25. VII.—15. VIII. Adreso: Aleš Berka en Brno, V Jirchářích 8.

**Veterinaroj-esperantistoj** aliĝu al la Universala Veterinara Asocio. Aliĝilojn postulu de ĈAE.

*

**Ĉeĥoslovaka literaturo en esperanto.** Nian alvokon pri esploro de esperantaj gazetoj kaj libroj por trovi tradukojn el nia literaturo sekvis — unusola samideano. Lia nomo kaj lia laboro estu kun danko sincera ĉi tie citita por instigi multajn sekvantojn.

S-ro instruisto Karel Slavíček el Úžice apud Rataje nad Sázavou kontrolis la jarkolektojn X.—XV. de La Progreso kaj sendis al ni la rezulton de sia serĉado nete skribitan sur slipetoj enmetotaj en nian grandan sliparon.

Bonvolu relegi la koncernan artikolon en n-ro 4 de la Bulteno kaj skribu al L i t e r a t u r a k o m i s i o n o d e Ĉ A E, ke vi estas pretaj helpi en ĉi tiu interesa kaj grava laboro.

*

**Poŝtkartoj** kun esperanta stelo aŭ kun emblemo de UEA aŭ kun geogr. karto de Ĉeĥoslovakio 1 ekz. Kč —·15, 25 ekz. Kč 3·50, 100 ekz. Kč 12·—. Afrankite liveras ĈAE.

**ĈEĤOSLOVAKA ANTOLOGIO**

Verko, kiun devas havi ĉiu ĉeĥoslovaka esperantisto. Libro de daŭra valoro. Majstraj tradukoj el ĉeĥoslovaka literaturo. Impona volumo riĉe ilustrita. Prezo Kč 70·— afr., por antaŭpagantoj ĝis 15-a de februaro Kč 60·—. En luksa ledo bindo Kč 80·—. Pagu tuj kun viaj EAĈSR kaj UEA-kotizoj.

# Ricevitaj libroj kaj gazetoj.

Librojn, ĉe kiuj estas notita prezo en Kč, liveros la Libroservo de ĈAE afrankite por la notita sumo.

*Julie Šupichová: Samideana Vortaro.* Eldonis A. Pražák, Jablonné n. Orl., 1935. 20 paĝoj, 10x14 cm. Prezo Kč 2·50. — Legante la broŝuron, oni povas ĉerpi utilajn stimulon kaj impulson. Ĝi volas kulturigi samideanan karakteron.

*BES-a adresaro.* 12-a eldono por la jaroj 1935-36. 80 pĝ, 11x14 cm. Prezo Kč 8·20 afr. La adresaro evidente plenumas bezonon. La nuna eldono kun 1154 adresoj el ĉiuj mondpartoj estos ĝoje salutata de ĉiuj korespondemuloj.

*Jaroslavo Hašek: La travivaĵoj de la brava soldato Švejk dum la mondmilito.* La dek unuaj ĉapitroj de la granda verko tradukitaj el la ĉeĥa de Josefo Štadler. 152 paĝoj, 18·5x12·5 cm. Eldonis 1934 SAT kaj ADLEL, Paris. Prezo: broŝ. Kč 21·—, bind. Kč 29·—. — Kvankam la traduko estas neniel perfekta („onklo" anstataŭ „nevo" ktp. ktp.), donas la libro al la internacia publiko bonan imagon pri la granda verko de Hašek. En E. apenaŭ ekzistas libro de tiel eminenta humoro. Tial estu la esperantlingva Švejk sincere rekomendata.

*August Strindberg: Pasko.* Dramo en tri aktoj. El la sveda trad. Stellan Engholm. Eld. Soc. Esperanto, Stockholm. 88 pĝ. Prezo Kč 10·—. — La nomo de la tradukinto garantias ne nur bonan tradukon, sed ankaŭ bonan elekton de verko prezentota al internacia publiko.

*Enciklopedio de Esperanto, II-a volumo* (K-Z). Redaktis L. Kökény kaj V. Bleier. Iniciatis I. Ŝirjaev. Eld. 1934—1935 Literatura Mondo, Budapest, Mester-u. 53. 327 teksto- kaj 184 bildopĝ, 23·5x15·5 cm. Prezo de ambaŭ volumoj (900 pĝ): broŝ. Kč 200·—, bind. Kč 230·—. La du volumoj prezentas la 6-an (lastan) verkon de AELA 1933. Por la ĉijaraj membroj de AELA la kompleta verko kostas: broŝ. Kč 158·—, bind. Kč 166·— afrankite.

*K. Kalocsay — G. Waringhien: Plena gramatiko de Esperanto. Vorto kaj frazo.* 372 pĝ., 23·5x15·5 cm. Eld. Literatura Mondo, Budapest, Mester-u. 53. La unua volumo de la lingvo-serio de AELA 1935. Prezo: broŝ. Kč 50·—, simple bind. Kč 62·—, sur luksa papero, led-imita bindo Kč 82·— plus 10% por sendkostoj. — Ni ege bedaŭras, ke manko de loko ne permesas fari detalan recenzon de la grava verko, kiu meritas ĉies atenton kaj varman rekomendon.

*Upton Sinclair: Jimmie Higgins.* Trad. Karl Fröding. 372 pĝ, 13x19 cm. Prezo: broŝ. Kč 36·—, plentole bind. Kč 46·—.

*Paul Giles* (profesoro ĉe Belga Instituto por altaj studoj): *Skizo pri Filozofio de la Homa Digno.* Trad. E. Lanti. 148 pĝ, 13x19 cm. Prezo: broŝ. Kč 19·—, plentole bindita Kč 27·—.

*Petro, kursa lernolibro,* 6-a eldono (nova kompostaĵo). 116 pĝ, 12x17 cm. Prezo Kč 10·—.

Ĉi lastajn tri verkojn eld. Sennacieca Asocio Tutmonda, 67 avenue Gambetta, Paris 20.

*E. Phillips Oppenheim: La Ora Ŝtuparo.* Eld. The Esperanto Publishing Co. Ltd. Prezo: bind. Kč 24·—.

*„Kan-u-go"*, tre ŝatata ludo en Anglujo nun havebla en esp. eldono. Ludebla de unu ĝis sep personoj. Prezo Kč 16·—.

*Japanujo,* nova eldono de gvidlibro, eld. Japana Fervoja Ministerio. Senpage! Ĝi baldaŭ elĉerpiĝos, tuj skribu al adreso: Direkcio por Turismo (Kokusai Kankoo-Kioku) en Japana Fervoja Ministerio, Tokio. — Vi grave subtenos tiun ĉi esp. eldonaĵon.

*Jerome K. Jerome: Tri homoj en boato* (por ne paroli pri la hundo). Gajaj aventuroj dum libertempo. Tradukis el la angla: G. Badash. Eldonis Literatura Mondo, Budapest. Formato 20x13·5 cm. 256 paĝa. Prezo broŝurita Kč 28·—, bindita Kč 36·—. Papero senligna, bindo el imitita ledo. Unua libro de la beletristika serio de AELA 1935.

*„Augusta Taurinorum"*, esperantlingva numero de tiu ĉi luksa revuo eldonita okaze de la kongreso kaj disdonata al la kongresanoj estas ankoraŭ ricevebla. La tre bele ilustrita kajero (40 paĝoj, 33x46 cm) estas ricevebla por du respondkuponoj aŭ 3 liroj de Comitato Manifestazioni Torinesi, Via Arcivescovado 7, Torino. Mendu!

*Th. Kilián: Esperanto a jeho tvůrce.* Původně vytištěno ve výroční zprávě Obchodní akademie Dra Albína Bráfa v Třebíči za školní rok 1934-35. (Esp-o kaj ĝia kreinto. Origine presita en Jara raporto de la Komerca akademio de Dr. Albín Bráf en Třebíč pri lerneja jaro 1934-35.) 28 paĝoj, 21x15 cm. Prezo 2 Kč. — Ĉeĥlingva broŝuro, kiu informas pri origino de esperanto kaj pri ĝia apliko en kelkaj sferoj. Ĝia legado estos utila ne sole al ne-esperantistoj, sed ankaŭ samideanoj profitos akiron de diversaj sciindaĵoj. La fakto, ke la verko aperis en jarraporto de la komerca akademio, estas per si mem grava faro. Ricevebla pere de nia L. S. por 2·20 Kč afrankite.

Rolf Nordenstreng: *La homaj rasoj de la mondo.* Scienco kontraŭ superstiĉo. Stockholm 1935. Eldona Societo Esperanto. 212 pĝ, 12x20 cm kun multaj ilustraĵoj. Prezo Kč 22·— broŝ., Kč 32·— bind. — Originala verko de sveda fakulo klarigas laŭ scienca vidpunkto la rasproblemon. Libro utila precipe en nunaj tagoj, kiam homoj sen klero, sed kun multe da malbonaj intencoj, klopodas internacie disvastigi sian malĝustan vidpunkton pri tiu demando. Bonega lingvo kaj bela eksteraĵo — kutima ĉe libroj de niaj stockholmaj amikoj — aldone al la interesa kaj aktuala enhavo, rekomendas la verkon.

Vychází 6krát do roka. — Vydavatel: Svaz čsl. esperantistů v Praze XIX., Uralské n. 447. — Zodpovědný redaktor Fr. Slavík. - Tiskne A. Pražák Jabloné n. O. - Novinová sazba povolena Ředitelstvím pošt a telegrafů v Praze, č. 102.047-VII-1933. - Podací úřad Praha 45.